

# KOMENCANTO

*gazeto por komencantaj aŭtoroj kaj komencantaj esperantistoj*



**Snejana Kononova**

INiiniaia OMKA. Omska reg., Ruslando!

2000

redakcie — dankon al niaj perantoj — Zamenhof kaj literaturo  
aforismoj — distraj paĝoj de niaj pasintjaraj kunaŭtoroj  
nova proverb-ludo — sufiĉe komplika vort-enigmo  
anekdotoj — korespondu!

2

## PERANTOJ de KOMENCANTO

*laŭ ĉi-subaj adresoj vi povas aboni nian gazeton*

### ARGENTINO

Argentina Esperanto-Ligo, Casilla de Correo 2910 - Correo Central, AR-1000 Buenos Aires.

### AŬSTRALIO

Libroservo de AEA, Esperanto-domo, 143 Lawson St., Redfern N.S.W. 2016

### BRAZILIO

Brazila Esperanto-Ligo, Caixa Postal 03625, Brasilia (DF) - BR - 70084-970

### BRITIO

Esperanto-Asocio de Britio, 201 Felixstowe Road, Ipswich, IP3 9BJ

### ĈEĤIO

Vladislav Hasala, A.Dvoráka 1, CZ-696 62 Strážnice

### DANIO

La Gazetoservo de Danio. Frederik Eriksen, Finsensgade 10, DK-4800, Nykøbing F.

### ESTONIO

Virve Ernits, Mahla 65 — 1, EE — 0012, Tallinn

### FRANCIO

- Unuiĝo Franca por Esperanto, 4 bis, rue de la Cerisaie, 75004, Paris.

- R.Melo, 34, Av. de Russie, FR-03700, Bellerive S/A

### GERMANIO

Dr. Wolfgang Schwanzer, Pfarrer-Seeger-Strasse, 9 D-55129 Mainz.

### IRANO

Irana Esperanto-Centro, P.O.Kesto 17765-184, TEHRAN

### ITALIO

Itala Esperanto Federacio, Via Villorosi, 38, 20143, Milano.

### ITALIO, KROATIO, SLOVENIO

Višnja Branković, Via Leghissa 6, IT-34131 Trieste

### KUBO

Lazaro Azcuy Ravelo, str. 25 #5611 c/56460 Playa 11300, HAVANO

### LITOVIO

Litova Esperanto-Asocio, LT-3000, Kaunas, ab.k. 167.

### NORVEGIO

Norvega Esperantista Ligo, Olaf Schous vei 18, N-0572 OSLO

### POLLANDO

Maciej Wnuk, Skrytka 105, ul. Broniewskiego 77-137, PL-01-865 Warszawa

### SVEDIO

SEF, Lisbet Andréasson, Södra Rörum pl 455, SE — 24294 Hörby

### SVISLANDO

Christoph Scheidegger, Im Schleedorn 6, CH — 4224 Nenzlingen

### USONO

Esperanto Ligo por Norda Ameriko, P.O.Box 1129, El Cerrito, California 94530, U.S.A.

## redakcie

Karaj legantoj!

Fin-fine nin atingis preskaŭ ĉiuj abonlistoj de niaj perantoj kaj ni plezure akceptas novajn legantojn en nian kolektivon.

Ĝuste pro la atendado de la abonlistoj estis prokrastita dissendo de la dua kajero de KOMENCANTO-2000, sed dank'al efektiva laboro de la perantoj ni havas multajn novajn abonantojn. Dankon al ĉiuj, kiuj helpas disvastigi KOMENCANTOn sur nia planedo!

La enhavo de la 2-a kajero estas sufiĉe tradicia. ESPERANTO kaj LITERATURO - rakonto pri literaturaj verkoj de L.Zamenhof. Ni publikigas plenan tekston de "La Espero" por la juŝ bakitaj komencantoj.

Ekde la 5-a ĝis la 10 paĝo vi trovos distrajn materiaĵojn ĉefe de niaj jam konataj kunaŭtoroj. Kiel kutime abundas desegnaĵoj, debutas kiel pentristoj en nia gazeto *Santi Elena Bullo* el Italio kaj *Maŝa Terjoŝina* el Ujjanovsk, Ruslando. Ni lanĉis novan ludon je la temo "Ĉu vi volas esti riĉa aŭ feliĉa?"

De sur la kovrila paĝo vin salutas la Drako - simbolo de tiu ĉi jaro, ankaŭ ene de la kajero estas multaj simpatiaj drakoj kaj draketoj!

Tradicie ni petas vin, karaj legantoj, precipe vin, karaj niaj novaj abonantoj: estu kuraĝaj kaj sendu viajn literatur' kaj traduk'provojn por KOMENCANTO, ja nia gazeto estas por vi kaj farata de vi!

AGRABLAN LEGADON!

DANKON !

al s-ino van Bentum van den Broek  
el Nederlando pro la donaco al KOMENCANTO  
de 30 nederlandaj guldenoj

## KOMENCANTO

2000 numero 2 / refondita en 1997/ 8 numeroj jare redaktas kaj eldonas: Viktor Kudrjavcev  
konstanta kunlaboranto: Rafija Jafasova  
adreso:

620041, Ekaterinburg, ab. ja. 132, Ruslando  
retpoŝto : let@epost.uralpost.ru

abontarifo por 2000:

internacia tarifo: 13 eŭroj aŭ \$14;

orienteŭropa kaj latinamerika tarifo : \$11;

aŭ por ĉiuj — 15 IRK

konto ĉe UEA: vkud-a

ruslanda tarifo kaj la rubla zono : 77 рублей

(за 8 номеров в год) простым почтовым переводом на имя Кудрявцева Виктора Васильевича: 620041, Екатеринбург, а. я. 132

# Literatura agado de L. Zamenhof



Post la mallonga konatigo kun la periodoj de la esperanta literatur-historio en la antaŭa numero, ni daŭrigas nian rakonton pri esperanta literaturo, kaj unuavice pritraktas literaturan agadon de la lingvo-aŭtoro mem.

Por evoluigi kaj disvastigi Esperanton, Zamenhof verkis originalajn poemojn kaj eseojn, sufiĉe multe tradukis. La verkojn de la kreinto de Esperanto oni subdividas je tri kategorioj: 1) la originalaĵoj, 2) la tradukoj, 3) la prilingvaj verkoj. Sube ni prilumos ĉiun el ili.

Jam la "Unua Libro" de Zamenhof, aperinta en 1887, enhavis du liajn originalajn poemojn: "Mia penso" kaj "Ho, mia kor'". Fakte tiuj du poemoj estas "intimaj konfeso" de la lingvo-aŭtoro kaj - kiel trafe nomis ilin *Marjorie Boulton* - "profunde personaj". En la linioj de "Mia penso" ni trovas kiel multe da plej kara - la junecon, la grandskalajn penon kaj laboron, - metis Zamenhof sur la "altaron" de sia ideo agado.

"Ho, mia kor'" - parolas pri la maltrankvilo de la lingvo-kreinto antaŭ lia decido prezenti sian lingvon al la mondo.

Ho, mia kor', ne batu maltrankvile  
El mia brusto nun ne saltu for.  
Jam teni min ne povas mi facile,  
Ho, mia kor'!

Ho, mia kor'! Post longa laborado  
Ĉu mi ne venkos en decida hor'!  
Sufiĉe, trankviliĝu de l'batado,  
Ho, mia kor'!

Pli malfrue Zamenhof verkis kvar tiel nomatajn movadajn poemojn: "La Espero", kiu fariĝis tradicia himno de la Esperantomovado; "La vojo" - parolanta pri la granda celo, kiu "simile al stelo en nokta ĉielo... briletas tra densa mallumo..." kaj al kiu iras ĉiuj, kiuj nomas sin esperantistoj. La aŭtoro alvokas nin "nur rekte, kuraĝe kaj neflankiĝante ni iru la vojon celitan!" La tria poemo "Al la farto", aperinta en 1899, estas kvazaŭ la kuraĝigo por la unuaj samideanoj de tiuj jaroj:

Forte ni staru, fratoj amataj,  
por nia sankta afero!  
Ni bataladu kune tenantaj  
per unu bela espero!

La kvara el tiuj poemoj - "La preĝo sub verda standardo". Ĝin Zamenhof verkis por la unua Esperantista Kongreso kaj deklamis en la fino de sia kongresparolado. Ĝi estas esprimo, farita en solena formo, de idealoj de la lingvo-kreinto mem kaj de la aktivuloj de la movado: "ni inter popoloj la murojn detruos"... ili "falos por ĉiam, kaj amo kaj vero ekregos sur tero".

Pri la valoro de Zamenhofs poezio *John Francis* skribis:

"La poemojn de Zamenhof, nurajn emociajn lirikaĵojn, oni ne povas serioze kompari kun la ĉefaj juveloj de la grandaj naciaj literaturoj, sed por sia distinita celo ili estis perfektaj: sufiĉe rimriĉaj-por sugestii la teknikajn eblaĵojn de la lingvo nova, sufiĉe tintaj por faciligi parkeron, sufiĉe simplaj por

allogi tre variajn homtipojn, kaj sufiĉe emociaj por pruvi la vivecon de la lingvo."

Aparte necesas menciiri pri la konata poemo de Zamenhof "La Pluvo", kiu estis verkita en 1909. Ĝi estas la plej lirika kaj belarta lia poemo, samtempe ĝi estas tre persona, kaj bone esprimas trolacon de la aŭtoro, kiu "aŭskultas... kion diras la voĉo aera", ĝuas la freŝon, donantan de pluvo, kaj ni, legantoj, ankaŭ kune kun la aŭtoro aŭdas tiun senĉesan pluvan bruon kaj sentas allogan freŝon de la aero. Pravas *Marjorie Boulton*, skribante, ke ĉi-tiu artverko vekas senton de vera bedaŭro, ke li (Zamenhof-red) ne verkis aliajn poemojn tiel personajn kaj artismajn."

## PLUVO

Pluvas kaj pluvas kaj pluvas kaj pluvas  
senĉese, senfine, senhalte,  
el ĉiel' al la ter', el ĉiel' al la ter'  
are gutoj frapiĝas resalte.

Tra la sonoj de l'pluvo al mia orelo  
murmurado penetras mistera,  
mi revante aŭskultas, mi volus kompreni,  
kion diras la voĉo aera.

Kvazaŭ ia sopir' en la voĉo kaŝigas  
kaj aŭdiĝas en ĝi rememoro...  
Kaj per sento plej stranga, malĝoja kaj ĝoja,  
en mi batas konfuzo la koro.

Ĉu la nuboj pasintaj, jam ofte viditaj,  
rememore en mi reviviĝis,  
aŭ mi revas pri l'sun', kiu baldaŭ aperos  
kvankam ĝi en la nuboj kaŝiĝis.

Mi ne volas esplori la senton misteran,  
mi nur revas, mi ĝuas, mi spiras;  
ion freŝan mi sentas, la freŝo min logas,  
al la freŝo la koro min tiras.

En la originala prozo de Zamenhof ne estas beletraj verkoj. Lia prozo prilumas esperantismajn aŭ lingvajn problemojn. Sed liaj "Esenco kaj estonteco de la ideo de la Lingvo Internacia" kaj la kolekto de "Kongresaj paroladoj" - estas verkoj, kiuj havas apartan signifon kaj valoron. En la unua, leganto nepre "trovas profundecon de penso, potencon de logiko, klaron de saĝo, kiuj donas al tiu libreto eksterkutiman valoron por klerigado" - laŭ la karakterizo de *War-inghien*.

La Paroladojn Zamenhof preparis por ĉiuj E-kongresoj, kiujn li ĉestis, ekde la unua en Bulonjo en 1905 ĝis la 8-a en Krakovo en 1912. Ĉiuj paroladoj estas plej intime pripensitaj kaj plej skrupule redaktitaj, ĉie oni sentas entuziasmon de la lingvo-kreinto, sindonemon al liaj idealoj. "Kiu volas posedi ĝustan bildon pri Zamenhof - skribas Waringhien - tiu prenu liajn du libretojn, la Esencon kaj Paroladon: lian tutan inteligenton kaj lian tutan koron. Ili estas el la nombro de tiuj nemultaj verkoj, kiuj honorigas la homaron"

La tradukoj okupas en verkaro de Zamenhof plej ampleksan kaj gravan parton, ĉar li mem rigardis plej decida por la evoluo de la lingvo la tradukadon de ĉefverkoj de mond-literaturo. *Marjorie Boulton* skribas, ke "lia traduk-laboro estus en si mem ŝajne sufiĉa tasko por unu vivo"

Traduko de "Hamlet" en 1894 bone sukcesis; glate legebla, stile ekzempla ĝi fariĝis tre efika propagandilo de la lingvo. Zamenhof ankaŭ tradukis la tutan "Malnovan Testamenton", "La Revizoron de *Gogol*, la versan dramon "Ifigenio en Taŭrido", de *Goethe*, kiun oni prezentis dum la Dresdena kongreso, (1908); la tragedion "La Rabistoj" de *Schiller*, la komedion "Georgo Dandin" de *Moliere*, la "Batalo de l'vivo" de *Dickens*, "La Rabeno de Baharah" de *Heine*, "La gimnazio" de *Šolem Alejhem*, "Fabeloj" de Andersen, kiuj estis tradukitaj el la germana lingvo, kelkajn mallongajn poemojn, inter ili la faman studentan kanton "Gaudeamus igitur" el la latina. Menciebla estas ankoraŭ la traduko de la iom sentimentala romano "Marta" de *Eliza Orzeszko*, poste pere de tiu ĉi traduko aperis ĉina kaj japana tradukoj de la romano, do, Esperanto unuafoje plenumis la rolon de traduka pontlingvo.

Estas rimarkinde, ke inter tradukoj de Zamenhof estas multaj teatraĵoj, kies vivaj dialogoj donis modelon de parola lingvo. Kaj ni denove uzos citaĵon el *Waringhien*, kiu skribas pri la valoro de Zamenhofaj tradukoj rilate al la lingva evoluo: "Ili pruvis al la kontraŭdirantoj, ke Esperanto povas servi kiel lingvo por libera esprimado de ĉiuj geniaj verkoj de la homa literaturo, ... ili helpis al la ellaboriĝado de la lingvo, ... ili progresigis Esperanton al "kreskanta elasteco" kaj fleksebleco, memorigante, "ke nia lingvo devas servi ne sole por dokumentoj kaj kontraktoj, sed ankaŭ por la vivo"

El la prilingvaj verkoj de Zamenhof la plej gravaj estas: la "Fundamento de Esperanto" (gramatiko, ekzercado, vortaro), kiun la Bulonja kongreso (1905, Francio) sankciis kiel netuŝeblan lingvobazon, kaj "Lingvaj respondoj" konsiloj pri la ĝusta uzado de la lingvo.

Finante nian skizan artikolon pri la literatura verkado de la unua esperantisto kaj la aŭtoro de la lingvo L. Zamenhof, ni volas kune kun *Marjorie Boulton* konsili al esperantistoj, ankaŭ al komencantoj, "ne forgesu studi liajn verkojn. Ĉiuj liaj verkoj liveras al ni bonegajn ekzemplojn de esperanta stilo; ne nur de gramatiko kaj semantiko, sed de modela klareco".

*Gaston Waringhien* — franco, profesoro, literatura recenzisto, unu el la plej konataj esperantistoj, prezidanto de la Akademio de Esperanto, ĝenerala koordinisto kaj ĉefa kunaŭtoro de Plena Ilustrita Vortaro

*Marjorie Boulton* — britino, dum pluraj jaroj aktivulino de Brita E-Asocio, literaturisto, verkistino instruisto.

# La ESPERO

En la mondon venis nova sento,  
tra la mondo iras forta voko;  
per flugiloj de facila vento  
nun de loko flugu ĝi al loko.

Ne al glavo: sangon soifanta  
ĝi la homan tiras familion:  
al la mond' eterne militanta  
ĝi promesas sanktan harmonion

Sub la sankta signo de l' espero  
kolektiĝas pacaj batalantoj,  
kaj rapide kreskas la afero  
per laboro de la esperantoj.

Forte staras muroj de miljaroj  
inter la popoloj dividitaj;  
sed dissaltos la obstinaj baroj,  
per la sankta amo disbatitaj.

Sur neŭtrala lingva fundamento,  
komprenante unu la alian,  
la popoloj faros en konsento  
unu grandan rondon familian.

Nia diligenta kolegaro  
en laboro paca ne laciĝos,  
ĝis la bela sonĝo de l' homaro  
por eterna ben' efektiviĝos.



**Santi Elena Bullo** [ MESTRE, Italio ]

Aforismo estas frato de anekdoto, amiko de paradokso kaj filo de saĝeco

{N.Neksin}

# AFORISMOJ



Fin-fine, kio estas malvero? Malvero estas bone maskita vero

{G.Byron}

Neniofarado estas feliĉo de infanoj kaj malfeliĉo de maljunuloj

{V.Gugo}

Afrozismo similas al abelo - en ĝi troviĝas kaj or-kolora mielo, kaj veneniga pikilo

{K.Silva}

La arta inspizo estas tiu gasto, kiu ne ŝatas viziti pigzulojn.

{P.Ĉajkovskij}

La plej taŭga respondo al stultulo estas silento

{persa proverbo}

Labozema abelo scipovas kolekti mielon eĉ el maldolĉaj floroj

{proverbo}

pentris sur la paĝo  
**Nina Vinnikova**  
[NOVOALTAJSK, Ruslando]

Esperantigis  
**Elena Kuznecova**  
[GORODOK, Belorusio]

La glozo estas la suno de mortintoj


{Napoleono}

En unu hozo de amo estas la tuta vivo

{Balzako}

La plej bona maniero ne perdi siajn amikojn estas ne pezfidu ilin.

{Mazner}



Jen la profito en la kontaktoj inter homoj:

unu devas tuj forgesi pri tio, kion li donis, la alia devas neniam forgesi pri tio, kion li ricevis.

{Seneka}

Bzaveco estas la venko super la teruro, sed ne ĝia manko

{M.Twine}

el la ĵurnalo "Argumentoj kaj faktoj", esperantigis  
**Aleksandra Stazajeva**  
[Nijnij TAGIL, Ruslando]

Se vi ne havas monon por kuzacisto - estu sana!

Plialtigante voĉon vi malpliigas intelekton

Divano, televidilo - kaj la homo malaperas...


Esperantigis  
**Alla Utkina**  
[LESNOJ, Ruslando]

Vivi - signifas peze labori kaj suferi, ĝis kiam ne kaŭzos al ni maljuneco, kaj tiam ni mallevas la brakojn sur la malvarman cindron de estingitaj lignofaŝtoj.

{J.London}

Espero estas bona matenmanĝo, sed malbona vespermanĝo

{F.Bekon}




Esperantigis kaj verkis

# Margarita Zueva

[MOSKVO, Ruslando]

## Filozofie

Rapidfluanta vivo  
 Rapiddissolvata sukero  
 "Maŝinpafila" parolo  
 Frumaturigantaj pastfolioj kukoj  
 Subita amo  
 Nepripensita edziĝo



Jurij Perevalov  
 [LESNOJ, Ruslando]

## Pri la bopatrino

En Azio ekzistas tribo "temiari". Edziĝante, la viro ne havas rajton paroli kun la bopatrino. Al li estas alpermesata eĉ loĝi kun ŝi en la sama ejo.

## Dum la ekskurso


Unufoje dum ekskurso la vivo kunpuŝis min kun esperantisto.

Ĉio okazis en Sobornaja placo de Kremlo. La esperantisto estis neĵuna viro, li metis al mi demandon esperante:

- Kiom da jaroj havas tiu ĉi ŝtono? - kaj li ekfrapis per kalkanumo de boteto en la ŝtonon.
- Ĉu al kiu precize? - redemandis mi.
- Jen, al tiu ĉi, - kaj li ankoraŭ unu fojon ekfrapis la ŝtonon.

Tiam mi per ŝupinto de ŝuo atentigis al unu el ŝtonoj kaj respondis esperante:

- Jen, tiu ĉi havas unu mil ducent jarojn, sed ĉi-tiu, kiun vi montras, havas unu mil tricent jarojn. Estis evidente, ke mi malicetis. Sed kiel do mi devus konduki? Mi volis, ke li mastru la situacion.
- (La ŝtonojn sur placo oni ne povas ekspluati dum jarmilo.- M.Zueva)*



Bill Thorne [LONDONO, Britio]

## Pensoj de ...

Esenco — ne pli multe posedi, sed malpli multe deziri.

Vivi — signifas ne nur esti vivanta, sed ankaŭ bone sin senti

## Pri mi

Somere de 1970, kiam mi havis tridek kvin jarojn, mi foje vizitis la distriktan poliklinikon.. Min akceptis komencanta kuracisto. Li observis min kaj diris:

— Via korpo havas multajn cikatrojn, kaj fierate de sia sagaceco demandis:

— Ĉu vi sendube militis?

— Militis, konsentis mi kaj aldonis: En la rusa-turka... Tute juna flegistino diris:

— Sed la rusa-turka milito estis en la pasinta jarcento.

— Jes, ĝuste tiam mi militis, - diris mi, foririnte el la kabineto de la kuracisto

# Bill Thorne

## La KLUBO

Mi trovis en ĵurnalo sarkasman leteron kontraŭ Esperanto, en kiu Usonano diris: “Ĉar la usona lingvo estis taŭga por nia Sinjoro Jesuo Kristo, ĝi estas taŭga por mi”.

Mi ĉiam ribelas kaj kontraŭas ĉion, kion mi legas, speciale reklamojn. Do, mi pensis: evidente Esperanto estas bona ideo. Mi elfosis la artikolon, kiu ĉagrenigis la usonanon, kaj tie estis pli ol dudek esperantaj vortoj, kaj adreso de la loka klubo. Sendube, la klubanoj ĝojus pro mia konvertiĝo: mi devis averŝi ilin, do mi iris tien.

Ĉe la pordo modesta ulo bonvenigis min.

Kiel vi fartas? - li demandis.

Mi ridegis. ‘Fart’ estas tre, tre kruda Angla vorto, kiu signifas “furzi”. Ha, ha, ha, ha, ha!

“Ho, jes mi fartas forte” - mi respondis, - lerte, laŭ mia listo da vortoj el la ĵurnalo. Mi jam estis spertulo.

Li rigardis min serioze, supre la okulvitroj. Evidente mi imponis lin. Kviete li diris: “Bonvolu enveni”, - kaj indikis la vojon.

Ŝajnis, ke okazos montraĵo de lumbildoj. Mi rigardis la homojn ĉirkaŭe, serĉante eblecon trovi amikinson. H’m. Dume oni prezentis la prelegonton, virinon samaĝan al mi.

La programo de bildoj komenciĝis. Mi tute ne komprenis, kion ŝi diris, sed la bildoj sufiĉis. Renversata aeroplano estis komenco de la vojaĝo. Hotelo diagonale en la foto, ĉar alie ĝi estus tro alta. Floroj en la parko nefokuse. Grupo da homoj tre malproksima en la placo. Manĝaĵoj surtable, denove nefokuse. Azeno kun flankkornoj.

Kelkfoje mi kaptis, en la historio, vortojn similajn al la miaj.



Bill Thorne, [LONDON, Anglio]



Jurij Perevalov  
[LESNOJ, Ruslando]

Do, mi povis konjekti iom kio okazis. Intertempe mia nova modesta amiko flustris tradukojn: ŝi vojaĝis kun du amikinoj...

Kiam ili atingis Grekujon, ili havis problemojn, porti la valizojn, pluvombrelojn, paltojn, fotilojn, memoraĵojn, kapkusenojn el la aviadilo, kaj gigantajn mansakojn por pasportoj kaj biletoj. Poste sensukcese ili esploris la urbon por trovi la Kongresejon. Ili vagis tra la stratojn, eĉ demandis la policanon, kiu nek komprenis ilin, nek volis helpi.

Tamen, ili renkontis alian grupon da homoj, kiuj ankaŭ havis palajn vizaĝojn, kaj kiuj evidente estis kaj alilandanoj, kaj Esperantistoj. Do, kune, post fotiĝo sur la placo, ili kunkune reiris al konstruaĵo, kiu surhavis, tre alte, grandegan verdan standardon kun verda stelo ktp., kiun ili jam preterpasis nevidante.

La prelegojn de la kongreso neniu memoras, kompreneble; estis nur vortoj. Post la prelegoj, ducent ĉeestintoj partoprenis manĝagon kune en la vasta manĝoĉambro. Ĉe ĉiu tablo sidis ses aŭ ok personoj kaj babilis. “El kiu lando vi venis? Kian laboron vi faras? Vidu fotojn de miaj infanoj. Ĉu vi komas Pol Duponte? Jes, li edziĝis denove kaj atendas bebon. Ĉu vere...?”


Subite, mia cinika perspektivo ŝanĝiĝis. Mi volis vojaĝi kaj iĝi perdita en strangaj urboj. Mi volis ŝteli kapkusenojn el aviadiloj. Mi volis fari malbonajn fotojn de fremduloj. Mi volis adori la sunon. Mi volis loĝi ĉe stranga familio, kaj iĝi amiko, vidi iliajn problemojn, vidi iliajn manierojn de vivo. Mi volis interŝanĝi leterojn kun vizaĝoj, kiujn finfine mi konos.

Tamen, por ke fari tion, bezonus, ke mi lernu la lingvon. Kian lingvon? La Grekan, la Germanan, la Polan, la Araban, kaj la Hispanan por komenci. Kaj poste, la Ĉinan. Mi ne kapablus. Feliĉe, la internacia lingvo sufiĉos, do mi strebos lerni ĝin. Alie, devigi la tutan mondon uzi la mian, kiu estas la plej bona kaj facila. Neeblas. Eĉ la sinjorino, kiu prelegis, ne parolis la mian, kion mi trovis, kiam mi provis inviti ŝin al mia hejmo.

# Alla Utkina

[LESNOJ, Ruslando]

Venis novaj ekzercoj por nia ludo-konkurso de la verkoj kun la vortoj je unu sama litero. Vort-ludas Alla Utkina el la urbo LESNOJ Sverdlovskaja regiono, Ruslando. La redakcio ripetas sian inviton al ĉiuj legantoj de KOMENCANTO amuzigi kaj trejniĝi tiamaniere. Ni atendas viajn novajn rakontojn kaj poemojn je unu sama litero.



**Nina Vinnikova,**  
[NOVOALTAJSK, Ruslando]

## ŜERCEMULO

Ŝipo ŝipiris. Ŝipestro Ŝiko ŝatis ŝaŭmvinon,  
ŝikan ŝereon. Ŝipestro ŝirmis ŝaŭmvinon, ŝloŝis ŝtalan  
ŝtalŝrankon. Ŝerceculo ŝipano Ŝato ŝvabris ŝipon.  
Ŝanco! Ŝato ŝtelis ŝereon, ŝtopis ŝaumakvon, ŝloŝis  
ŝtalŝrankon. Ŝipestro ŝokiĝis: "Ŝtelo! Ŝtelistoj!"

Ŝipo ŝipiris.. Ŝerceculo ŝipano Ŝato ŝatis  
ŝercojn, ŝaŭmvinon, ŝikan ŝereon.

## HANTA HOTELO

Homo Hjugo hazarde heredis hotelon, hantan hotelon. Horora  
heredaĵo! Honora, honesta homo hororus! Halucinaĵoj! Hipnoto!

Horora hotelo.

Horora hordo hotele huliganas:

herkula harkovrita homdriado hakas hejtoligon;

histriko havas hobion hojli "ho, ho!"

hamstro harpas;

harpio haŭlas haŭseron, harpio havas helbluan haŭton;

huzo hurlas;

hida hieno hundblekas;

hilo havas hipokondrion;

hipopotamo havas histerion.

Honesta homo hojlus: "Helpon!"

Horora hanta hotelo! Hu! Humana hotelmastro

Hjugo humiliĝis. Hjugo havas humoron. Hjugo havas  
honorarion!



**Maša Terjoĥina**  
[Uljanovsk, Ruslando]



sendis **Artur Ĥismatullin,**  
[Troick, Ruslando]

heredi - ckposedi post la morto de parenco hanta - fantoma horora - terura hordo - amaso herkula - granda, forta, potenca... (hom)driado - nimfo de la arboj histriko - besteto, kovrita per grandaj pikiloj hojli - laŭte boji, bleki hamstro - negranda kampa besteto harpi - muzikludi harpon harpio - sudamerika birdo, simila al aglo haŭli - tiri haŭsero - ŝnurego ĉe maristoj huzo - granda fiŝo hurli - boji, kriaci hida - malagrablega hieno - sovaĝa stepa hundo hilo - speco de rano



# Ludmila Leksina

[SUDĴA, Ruslando]

*Ĉi-paĝe nia konstanta abonanto Ludmila Leksina prezentas siajn provojn en nia vorto-ludo je unu litero. Ludmila finis la bazan kurson de esperanto koresponde, sed jam povas ĝongli per esperantaj vortoj kiel bone trejnita fakulo. Partoprenu en nia ludo "je unu litero"!*

## Ĉu...?

Ĉu, ĉevalo ĉesas ĉasi?

Ĉu, ĉazmulo ĉesas ĉazmi?

Ĉevalaĉo ĉesas ĉasi.

Ĉiĝonulo ĉesas ĉazmi

Ĉu ĉeestas ĉielulo

Ĉe ĉagzena ĉikanulo?

Ĉiopova ĉielulo

Ĉeĝas ĉeĝe ĉe ĉasisto.

## ZOO

Zebroj, zebuoj, zibeloj

Zigzage zoon zonas.

Zorgeme zumas zizeloj.

Zenite zefizo zomas ...


## Ŝercemulo

Ŝakludadi ŝatas ŝaho.

Ŝejko ŝoke ŝerci ŝatas.

Ŝercemulo ŝutas ŝakon.

Ŝaho ŝejkon ŝerze ŝvabzas.



alsendis **Artur Hismatullin**, [TROICK, Ĉelab. reg., Ruslando]

## La edzo,

## aŭ la kato?

Foje  
mia edzo longe  
estis en vojaĝo. Mi estis hejme kun  
kato. La kato estis granda kaj bela. Kaj ĝi dolĉe murmuris...  
La edzo revenis subite. Kiam li ekvidis nin, tuj li ĉion komprenis. Lia ĵaluzo  
estis senlima. Li kriegis, provis bati la katon. Finfine li diris:  
"Elektu! Mi aŭ la kato!"

Mi pensis ne longe. Kiu el ili estas juna, karesa belulo? Kiu estis pli akurata?  
Kiu neniam drinkis? Kaj finfine, kiu pli mamlmulte manĝis?  
Certe, la kato! Sendube, la kato!  
Kaj mi elektis la katon. Tio estis delonge. Nun mi havas alian  
edzon kaj alian katon. La kato estas granda kaj bela. Kaj ĝi  
dolĉe murmuris.

la kato de

**Snejana Kononova**

[Nijnjaja OMKA, Omska reg., Ruslando]

# Ĉu vi volas esti riĉa aŭ feliĉa?



Bill Thorne [LONDONO, Britio]

## Nova distra-amuza ludo

Antaŭ unu jaro ni anoncis konkurson pri la rakontoj, kies ĉiuj vortoj komenciĝas je unu sama litero. Ĉu sukcese aŭ ne tre, tamen la rezulto estis kaj estis kelkaj nemalinteresaj ekzercoj. La redakcio decidis ne nomi ĝin konkurso, ĉar fakte por ni kaj niaj legantoj tute ne gravas, kiu gajnos, gravas, ke estu interese kaj leginde. Kaj, sendube, similaj ekzercoj estas efektive utilaj por trejnado de la lingvouzo por komencantaj altoroj, kio estas unu el la ĉefaj celoj de nia gazeto. La vicaj ekzemploj troviĝas ankaŭ en tiu ĉi kajero sur la paĝoj ses kaj sep.

Ek de tiu ĉi numero de KOMENCANTO ni lanĉas novan ludon, kies devizon vi vidas supre. Ni invitas ĉiujn niajn legantojn respeguli la temon. Vi povas: trovi taŭgajn aforismojn kaj proverbojn. Anekdotojn. Verki aŭ traduki versojn, rakontojn, noveletojn. Publikigi ekzemplojn el via propra vivo...

Ĉi-sube vi trovos proverbojn kaj aforismojn, kiujn la redakcio prenis el la lernolibro de Boris Kolker "Эсперанто. Основной курс" (Esperanto. La baza kurso) rusingva lernolibro [Moskvo, 1992]

Pli gravas amiko, ol mona fabriko

La tempo venos - ni ĉion komprenos

La homoj povas esti feliĉaj, nur se la feliĉo ne estas celo de ilia vivo (*Orwell*)

La sano ne estas ĉio, sed ĉio sen sano estas nenio

Se vi ne scias, kion fari - faru nenion.

Oni ĉiam troigas sian saĝon kaj ies riĉecon.

Tre malĝoje estas ĝoji en soleco. (*Lessing*)

Post morto kuracilo jam estas sen utilo

Kia estas via laboro, tia estas via valoro

# Sufiĉe komplika vortenigmo

Stanislav Kacko [KURGAN, Ruslando]


Estas sufiĉe komplika vortenigmo. Oni devas diveni la vortojn kaj trovi ilin en la kvadrato. La liter-ĉenoj povas situi en ajnaj direktoj — dekstren, liven, suben, supren.

Ekzemple *-hundo*

Post kiam vi korekte forstrekos la vortojn en la kvadrato, devas resti literoj nefor-strekitaj. Tiuj literoj laŭ linioj kompilos la frazon pri nia gazeto KOMENCANTO.

- |                            |                          |
|----------------------------|--------------------------|
| 1. Hejma animalo           | 7. Legomo                |
| 2. Monato de jaro          | 8. Eksterlanda mono      |
| 3. Parto de minuto         | 9. Speco de urba trafiko |
| 4. Ujo por floroj, fruktoj | 10. Dika, solida papero  |
| 5. Tago de semajno         | 11. Parto de vorto       |
| 6. Agrabla odoro de floro  | 12. Neatendita donaco    |

d	o	k	o	r	a	o	a	r	d
n	m	o	m	e	v	s	m	n	o
u	c	o	o	z	a	e	a	d	o
h	i	z	n	o	s	k	u	n	t
o	r	u	s	e	u	b	e	s	o
t	p	r	i	l	t	t	l	a	t
o	s	e	t	o	m	r	o	i	u
m	o	r	a	r	g	o	n	o	l
a	t	a	m	b	n	t	r	z	a
e	o	t	e	v	o	k	a	o	v



**Elena Kuznecova**  
[GORODOK, Belorusio]

En la Amazonio ekfalas la aviadilo. Al la aviadisto venis la indiĝenoj. La aviadisto diras:

— Mi veturis en la fera birdo. La birdo ekfartis sin malbone, ĝi frakasiĝis kaj mortis... Sed mi restis viva.

Unu el la indiĝenoj demandas lin:

— Se vi estas la aviadisto, kial vi parolas, kvazaŭ vi estas kreteno?

\*\*\*

Tri vendejoj situas unu apud la alia. La mastro de la dekstra vendejo pendigis la ŝildon: "Ni havas la plej malaltajn prezojn" La mastro de la maldekstra vendejo pendigis la ŝildon: "Ni havas la plej kvalitajn varojn" La mastro de la meza vendejo pensis kaj pendigis la ŝildon: "La ĉefa eniro estas ĉi-tie"

\*\*\*

La ebria edzo revenas hejmen kaj decidas, kiel trompi la edzinon: — Mi eniros, sidos kaj legos la libron. La edzino ekvidos kaj opinios, ke mi estas sobra!

Hejme li sidas kaj legas. Lia edzino eniras en la ĉambron kaj demandas

— Kion vi faras?

— Mi legas libron. Ĉu vi ne vidas?

— Vi estas ebria! - krias la edzino. —

Tuj fermu la valizon kaj enlitiĝu!

**Margarita Zujeva**, [Moskvo, Rusio]

— Kial vi ŝtelis la violonon ĉe'via najbaro? demandas la juĝisto. — Kial vi ĝin ŝtelis, ja vi tute ne havas muzikkapablojn?

— Ankaŭ li ne havas tiajn kapablojn!

\*\*\*

Sinjorino al taksiisto:

— Veturigu min al la alia flanko de la strato, al tiu sinjoro apud ĵinejo.

— Ĉu la sinjorino timas transiri la straton?

— Ne, sed li atendas jam 40 minutojn. Se mi alveturos per taksio, tio aspektos, kvazaŭ mi tre rapidis.

\*\*\*

— Kio vin tie turmentas? - demandis la patro al la filo, kiu eksopiris super la kajero.

— Oni al mi donis trovi la *ĝeneralan denominatoron*.

— Kiel? Ĝin oni serĉis dum miaj lernejoj. Ĉu efektive ĝis nun oni ne trovis ĝin?

\*\*\*

Oni demandas iun viron:

— Kial vi portas ŝuojn je du numeroj malpligrandajn ol vi bezonas?

— Intence. Mia edzino malbone kuiras, la filo estas huligano, la bopatrino - serpento...

Por mi restas nur ŝola ĝojo en la vivo - kiam mi vespere demetas la ŝuojn!

\*\*\*

Maljuna ĉasisto admiras:

— Vi ne povas imagi, kiom neordinare saĝas mia hundo! Tio estas fenomeno!

— Mi jam rimarkis, respondas la dua ĉasisto, ĉiufoje, kiam vi prepariĝas pafi, via hundo kaŝiĝas post la plej dika arbo...



**Jurij Perevalov**  
[LESNOJ, Ruslando]

# KORESPONDU!

Ĉiu kadro kostas 10 rublojn por rusianoj aŭ 2 IRK por eksterlandanoj. Pagintaj abonantoj de "K" - senpage

*Thor Holmaren*  
18 jaroj, ŝatas sporton,  
korespondi tutmonde  
Tellusg. 23 A  
260 35  
ODAHRA  
SVEDIO

*Lou Fauenius*  
18 jaroj, mi ŝatas bestojn,  
mia hundo estas  
malgranda, bela kaj gaja.  
Stora Algatan 5  
LUND  
SVEDIO

*Lina Hallén*  
18-jara Mi estas tre feliĉa  
kaj mi volonte  
korespondos kun vi  
Geijersgatan 6  
25440  
HELSINGBORG  
SVEDIO

*Tomas Halenvik*  
18 jaroj, deziras  
korespondi tutmonde  
Edwin Berlingsgatan 22  
25250  
HELSINGBORG  
SVEDIO

*Nina Hansson*  
18 jara, korespondi  
tutmonde  
Carl Ohrsgatan 2g  
25443  
HELSINGBORG  
SVEDIO

*Manuela Jensen*  
18 jara, ŝatas bestojn,  
korespondi tutmonde  
Parkgatan, 5  
260 51  
HELSINGBORG  
SVEDIO

*Esperanto-klubo*  
volas korespondi kun  
esperantistoj tutmonde  
Esperantistas' Club  
Narimanov street  
kvartalo 3, ev 8/19, m 18  
SÜMGAYIT, 373200,  
AZERBAJĜAN

*Gafurian Gazizov*  
41 ja., ĉiĉerone helpas al vi  
vojaĝi en la Sud-Urala parto de  
Baŝkirio, parolas esperante,  
france, hispane kaj iom angle  
SALAVAT - 16, a.k. 356,  
453200, BAŜKIRIO,  
RUSLANDO

*Jurij Perevalov*  
32 ja., inĝeniero-mekanikisto,  
korespondi kun fraŭlinoj pri  
belaj, graciaj artoj tutmonde  
pk 252 (por Cvetkov)  
LESNOJ, 624200,  
Sverdlovskaja obl.  
RUSLANDO

*s-ro Fulvio Scarpa*  
deziras korespondi  
tutmonde pri ĉiuj temoj  
Fondo Versace  
89100  
Reggio, Calabria,  
ITALIO

*s-ro Karel Strouha*  
tre deziras koprespondi  
kun esperantisto(j) el  
BRAZILIO, pri ajnaj  
temoj, aparte pri spicoj  
Ul. Kamenice, 114-  
Nachrod-1, 547C1,  
ĈEĤIO

*s-ro Garsia*  
*Henriquez Viktor*  
korespondi diverse  
str Commodoro Rolin,  
No 4-1-1 isq, ES-38007  
SANTA CRUZ de  
TENERIFE, via Spain  
KANARIAJ INSULOJ

*Eugeniusz Rybarczyk*  
Mi volonte oferos mian liberan tempon al esperantistaj  
grupoj, kiuj planas kaj deziras viziti Kopenhagon. Mi  
estas pensiulo, kaj turismo estas mia hobbio (ne profesio).  
Pro tiu kaŭzo mia gvido estas senpage, sed mi bone konas  
la urbon.

Bispeparken 29.lth, DK-2400 KOPENHAGO NV,  
DANLANDO [el *La Ondo de Esperanto*]

*Elena Kuznecova*  
Uzi la Internacian Lingvon  
diversmaniere Kolektas  
aforismojn  
Veremcevka 151  
GORODOK  
211540 Vitebskaja obl.,  
BELORUSIO

*Vladislav Jurĉenko*  
26 ja., inĝeniero-konstruisto,  
korespondi tutmonde, bk.,  
pm., logikaj ludoj, ĉeĥa lingvo  
Malinovskij, 25-200  
KIEV  
04210  
UKRAINIO

## Monda Enketo pri Jesu-Kristo: Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista

Ni invitas asociojn, grupojn, anojn kaj gazeton de la Esperanto-  
movado disvastigi la enketon. Ni invitas plenumi ĝin ĉiujn espe-  
rantistojn kaj eĉ neesperantistojn. Ĉiu homo rajtas respondi, al  
kiu ajn religio li apartenas, eĉ nekredanto.

La rezultojn ni prezentos dum la 21-a Mitingo por la Amikeco in-  
ter la Popoloj en Rimini (Italio) fine de aŭgusto 2000-a Por la re-  
spondo bonvolu uzi duonon de blanka folio A4 kun jenaj linioj:

**KIU ESTAS JESU-KRISTO POR MI**

-----  
----- (proksimume 10 liniojn) -----  
Mia religio \_\_\_\_\_ Lando \_\_\_\_\_ Aĝo \_\_\_\_\_  
Profesio \_\_\_\_\_ Plena nomo \_\_\_\_\_  
Adreso \_\_\_\_\_

I.K.U.E. ĉe Gambuti A., Via Bellini 24,  
I-47039, Savignano sul Rubicone, ITALIO

## KOMENCANTO-2000

abono de KOMENCANTO-2000 kostas 77 ruslandajn rublojn.  
Internacie: 13 eŭroj al UEA-konto "vkud-a" aŭ ĉe via landa peranto

